



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 3
1974

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
Redaktoro: Hans Amund Rosbach

3-a periodo
41-a (50-a) jaro
Dumonata

Esperanto-kongreso sub noktomeza suno!

La 44a Norvega Esperanto-Kongreso okazos en Tromsø de la 4a ĝis la 7a de Julio 1975. Ĝin aranĝos la Esperantokubo «La Norda Lumo», la plej norda Esperantoklubo en la mondo. Nur unufoje ĝis nun Norvega Esperantista Ligo okazigis sian kongreson en Norda Norvegujo, nome en Narvik en 1953.

Ni antaŭvidas, ke estos granda intereso por la kongreso. Kompreneble ni atendas multajn norvegajn kongresanojn, sed ni invitas ankaŭ la esperantistojn el la tuta mondo. El nordaj Svedujo kaj Finnlando la distanco ne estas tre longa, sed certe ankaŭ multaj samideanoj el malproksimaj landoj deziras travivi esperantistan renkontiĝon apud la Arktika Maro.

Tromsø estas la plej granda urbo en Norda Norvegujo, kun proks. 43 000 loĝantoj, kaj ĝi kreskas rapide. La

ĉefa kaŭzo estas la nova universitato. Laŭ areo Tromsø estas la plej granda urbo de nia lando, 2400 km². La urba centro estas la insulo Tromsøy en la markolo Tromsøysund. Du modernaj pontoj, longaj po pli ol 1000 m, ligas la insulon al la kontinento oriente kaj al la granda insulo Kvaløya okcidente.

Per komforta aeroplano la vojaĝo Oslo—Tromsø daŭras malpli ol du horojn, per ŝipo kaj fervojo kelkajn tagojn. Rekomendinda estas veturo vagonare de Oslo ĝis Trondheim aŭ ĝis Bodø, por daŭrigi norden per ŝipo. Ĉiutage laŭbordaj rapidŝipoj haltas en Tromsø, unu survoje norden, alia suden. Ĉiusomere diversaj turistŝipoj vizitas la urbon.

Situante je preskaŭ 70° de norda latitudo Tromsø estas la plej granda urba socio de la mondo tiel proksime

(daŭr. p. 38)

Sciigoj de N.E.L.

La aŭtuna agado. Kvankam la jarraporto de N.E.L. pri 1973 montras mikroskopian kreskon de la membronombro, evidente daŭre okazas tro malmultaj kaj tro malgrandaj kursoj por efike antaŭenpuŝi la Esperantomovadon en nia lando. La plialtigo de la kotizoj ne sufiĉis por starigi ekvilibran buĝeton por 1974 sen la helpo de la Kampanjo Reisæter. Nur la kluboj kaj la rektaj membroj povas alporti ŝanĝon. La Liga Estraro tial insiste admonas al ĉiuj klubaj estraroj tuj kunveni por plani aranĝon de kursoj dum la venonta aŭtuno. Ni konstante vidas pruvojn pri kreskanta intereso en la publiko multloke en la lando, i. a. duobligis la nombro da lernantoj ĉe la korespondaj kursoj en 1973. Per bone planita laboro oni certe povos kolekti interesigantojn por kursoj. Sed necesas frue plani la kursagadon. *Do, ekagu jam nun!* NEL estas preta helpi per kursmaterialoj kaj konsiloj. Se neniu loka samideano povas gvidi kurson, oni klopodu fondi studrondon por komencantoj per la koresponda kurso. Petu pri nia studplano. Krome oni klopodu igi lokan gazeton publikigi nian gazetkurson (skribu al NEL pri regularo kaj provleciono). Sed komencu jam nun plani la aŭtunajn kursojn! — NEL havas ankaŭ pli ol 100 rektajn membrojn. Certe ankaŭ multaj el ili povus starigi kurson aŭ studrondon. Ni tial direktas ĉi tiun alvokon ankaŭ al ili. Ni petas ĉiun rektan membron, kiu estas preta fari klopodojn en tiu direkto, skribi al NEL, kaj ni plezure helpos ilin. Post kurso aŭ studrondo oni povos fondi Esperantoklubon en la loko. Estas tre dezirinde fondi klubojn en multaj novaj lokoj.

Taskotabelo por kluboj. — *Junio:* La estraro planas la aŭtunan laboron kaj precipe decidas detalojn rilate la aŭtunajn kursojn.

Julio: Antaŭ la 15a la sekretario sendas al NEL (kun kopio al la distrikto) raporton pri la 2a jarkvarono kun studraporto pri la 1a jar-duono dorsflanke (blankedo A 10 / E 1).

Aŭgusto: Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La estraro zorgas pri kursejo kaj kurspropagandiloj.

Septembro: La kursoj komenciĝas. La studgvidanto refunkciigas la studrondojn kaj fondas novajn. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Raporto de la Liga Estraro pri la 1-a jarkvarono. Okazis 2 estrarkunvenoj, kaj oni elsendis unu cirkuleron. Oni pretigis la buĝeton por 1974 kaj la jarraporton kaj la jarkalkulojn pri 1973. Oni fiksas la tagojn de la 44-a Norvega Esperanto-Kongreso: ĝi okazos en Tromsø 5.—6. Julio 1975. Norvega Esperantisto denove aperas en presita formo. La tuta biblioteko estas nun kolektita en N. Slottsgt. 3. La kaso ricevis du anonimajn donacojn, sume kr. 1100,00.

La Liga Estraro.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Provizora redaktoro:

Hans Amund Rosbach
Johan Hammond Rosbach

Adreso de la redakcio:

Nergt. 37 c, 6500 Kristiansund N
(Limdato por manuskriptoj: la 20.
en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 12,—.

Anoncprezoj: 1/1 p. kr. 150, 1/2 p. kr. 75,
1/4 p. kr. 40, 1/8 p. kr. 20.

La kontorfondaĵo

Pli frue	kr. 530,20
O. Rygg	» 100,00
La Norda Lumo, Tromsø..	» 100,00
R. H.	» 25,00
Mara Vento, Haugesund	» 200,00
Leif H. Bryn.....	» 30,00
R. Bugge-Paulsen	» 30,00
C. S. B.	» 20,00
I. Dahl	» 50,00
Ges.roj M.	» 25,00
S. Kubosch	» 5,00
R. Grotmål	» 25,00
	<hr/> kr. 1090,20

FERIO

La somero venos, kaj kun ĝi la ferio. Ankaŭ en nia movado ni ferias. Tio havas duoblan efikon: La klublaboro pli/malpli ĉesas, la organizitaj kunvenoj ne plu okazas. Aliflanke: Per la ĉiam pli granda turismo, la eblecoj por nia movado pligrandiĝas. Precipe en la feria tempo.

Iam — sub la Ejfelturo — iu fremdulo ekparolis al mi. Li estis el Brazilio. Li vidis mian verdan stelon. Alifoje mi iris al frizisto. — Estis verda stelo sur ties pordo.

Tial: Precipe en la feria tempo ni portu la stelon.

R.



Aldono al la jarraporto

Du kluboj (Sarpsborg kaj Trondheimjemo) postpagis por po unu membro por 1973, tiel ke la tuta membronombro estas ne 509, sed 511.

Kampanjo Reisæter 1974

Pli frue	kr. 800,00
Ingvald Dahl	» 100,00
	<hr/> kr. 900,00

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

Membroj subtenantaj 1974

Bjørg Skaret
O. J. Rønnevig
St. Kjetland
Hjalmar S. Nilsen
Aage Falch
Ellen Høeg
J. Berggreen

Al norvegaj esperantistoj.

Se vi estas vegetarano, aŭ se tiu temo interesas vin, bonvolu sendu al mi vian nomon kaj adreson.

BJØRG NORSTED,
Skåra, 1620 Gressvik.

Raporto de la Gazetara Servo pri 1973

Oni elsendis al la gazetaro 8 bultenojn kun sume 21 novaĵoj. Oni registris entute 203 aperigojn de tiuj ĉi novaĵoj. Plie aperis 194 artikoloj, referaĵoj, debatkontribuoj el aliaj fontoj. Sume oni do registris 397 aperigojn, el kiuj 80 estis iom pli longaj artikoloj, 317 malpli grandaj notoj kaj referaĵoj. La nombro de gazetoj, kiuj ion aperigis pri Esperanto, estis 99.

La statistiko montras preskaŭ la saman nombron da aperigoj, kiel en 1972 (403), la nombro da gazetoj estis precize la sama: 99.

La nombro da aperigoj el aliaj fontoj ol niaj bultenoj, montras progreson, kio montras, ke la lokaj gazetaraĵoj reprezentantoj sukcesis aperigi materialon kaj utiligi la lokan

gazetaron.

En la komenco de la jaro la Gazetara Servo sendis cirkuleron kun gvidlinioj al la lokaj reprezentantoj; ĝi sendube havis efikon, kaj mi intencas elsendi similan cirkuleron ankaŭ ĉijare.

Dum la pasinta jaro parte estis malfacile trovi konvenan materialon por elsendo. Ne ĉiam okazas same multaj interesajoj en la movado. La novaĵoj, kiuj aperis en plej multaj gazetoj, estis la anticipa preparolo pri la Norvega Esperanto-Kongreso en Haugesund, plie la referaĵo pri tiu kongreso, kaj la informo pri 9000 lernejoj infanoj en Havajo, kiuj lernas Esperanton. La lokaj reprezentantoj lerte utiligis la prelegvojaĝon de Ciccanti.

Elna Matland.

La somero 1974

La agadgrupo «Inter» (Box 55028, S-400 53 Göteborg) aranĝos du sinkvajn aranĝojn kombine kun la 59a UK, nome restado 22—24a de Julio en Aalborg, Danujo, kaj 24—26a en Göteborg, Svedujo, kun agrabla kaj trunkvila programo, samtempe instrua kaj valora. — Informoj: Supra adreso.

*

15-a Eŭropa Feriosemajno en Svislando efektiviĝos de la 22a ĝis la 28a de Septembro en Magliaso ĉe la Lugano-lago. Oni logas per varia kaj distra programo en vere bela loko. Informas: Ernst Glättli, Laurstrasse 17, CH-5200 Brugg.

Internaciaj kursoj por Instruistoj okazos en Burgas, Bulgarujo, la 5an—24a de Aŭgusto, kaj internacia pedagogia esperanto-seminario samloke de la 11a—24a de Aŭgusto. Informoj ĉe: Okrâjen Esperantski Komitet, Ĥristo Botev 97, Sofio 3.

*

Migrado en Svisa Alparo: Oni marŝos 4 ĝis 8 horojn tage, dormos en kabanoj laŭlonge de la vojo. Petu informojn ĉe Somera Migrado, Daniel Mühlemann, Museumstr. 19, CH-5200 Brugg.

*

Internacia Esperanto-Tendaro en Finnlando. Detalan programon vi povos ricevi ĉe Taisto Suontausta, SF-k7300 Vääksy. Tempo: De la 6a ĝis la 14a de Julio.

La unua originala romano en Esperanto el norvega plumo

Ni legis de tempo al tempo, en la Norvega Kroniko, ke J. Hammond Rosbach «legis el sia nova libro» en la klubkunvenoj de La Urso en Sarpsborg. Scivole ni faras kelkajn demandojn por informiĝi, kiam ni povos atendi la libron.

— La libro estas ĝuste nun kompostata. Tion faras la Centra Oficejo en Roterdamo, respondas Rosbach.

— Ĉu Eldonejo Esperanto en Oslo eldonos ĝin?

— Ne, la norvega Eldonejo prizorgis nur mian unuan libron, «Bagatelaro». Poste mi devis iri eksterlanden. Kompreneble mi ĉiufoje unue turnis min al la norvega Eldonejo. Nun jam la trian fojon Dansk Esperanto-Forlag, t. e. la senlaca sinjoro Friis, eldonas mian libron.

— Ĉu denove novelaro?

— Ne, ĉifoje temas pri rakonto, kiu eble apartenas al la familio Romanoj. Almenaŭ la eldonisto karakterizas la verkon kiel romanon. Ĝi estas kvazaŭ taglibro — tamen neniel en taglibra stilo — el restado en norvega hotelo, kie diversaj homoj renkontiĝas, kaj kie diversaj problemoj estas diskutataj. Oni venis tien por ripozi, sed la eventoj ne estas ĉiam ripozigaj.

— Ĉu la titolo de la libro estas sekreto?

— Neniĝ. Post iom da cerbumado sinjoro Friis kaj mi decidis nomi ĝin VERDA ROBO. Mi ne volas malkaŝi ĉion, nur mencii, ke iu ŝtelas verdan robon, kiun oni fine retrovas en tre surpriza maniero.



Ilustraĵo el la libro

— Ĉu vi vidas ian linion en via verkaro?

— Nu, la unuan libron, Bagatelaro, mi eldonis por havigi legaĵon al tiuj, kiuj finis elementan kurson kaj kiuj deziras serioze studi Esperanton. — Parenteze mi diru, ke ĝi bedaŭrinde estas plena de preseraroj, kaj ja ankaŭ aliaj eraroj tute ne malestas. Nu, oni tiel favore akceptis ĝin, ke mi provis novan eksperimenton, eldonante «Homoj kaj riveroj» ĉe Koko en

Esperanto-kongreso . . .

(daŭr. de p. 33)

al la Norda Poluso. Dum multaj jaroj la urbo funkciis kiel elirpunkto de ekspedicioj kaj aliaj vojaĝoj en la arktikaj regionoj. Vico da esploristoj ekiris de Tromsø al Svalbardo (Spicbergo) kaj aliaj arktikaj lokoj. Plej konataj estas André, Amundsen kaj Nansen. Tial la urbo ofte estas nomata la Pordego al la Arktika Maro. Dum la mondmilito, la 12an de Novembro 1944, britaj aeroplanoj subakvigis la grandan germanan batalŝipon «Tirpitz» okcidente de la urbo.

Dum la somero la tagoj daŭras longe ĉi tie en la Nordo. De Majo ĝis Aŭgusto la noktoj estas lumaj kiel tagoj. De la 21a de Majo ĝis la 23a de Julio la suno ne iras sub la horizonton, ni havas noktomezan sunon. Sed kompreneble okazas, ke pro pluvo aŭ nuboj ĝi ne estas videbla. Dum la vintro, kontraŭe, la suno restas sub la horizonto dum preskaŭ du monatoj. Ni esperas ke la kongresanoj povos travivi restadon en Tromsø en bona, somera vetero kaj vidi la sunon brilantan dum la nokto.

La tempo, komence de Julio, estas oportuna. Se oni disponas iom da libera tempo, oni povos vojaĝi en riĉa,

Kopenhago. Tiu libro ne plu estas havebla. Ankaŭ «La mirinda eliksiro» estas kolekto de noveloj kaj skizoj, dum «Disko» jam estas ciklo, kiu pretendas ian unuecon. Kaj nun fine —

— la romano! Ĝi verŝajne estas la unua norvega romano originale verkita en Esperanto.

— Laŭ mia scio, jes.

pura kaj bela naturo.

La detaloj de la kongresa programo ankoraŭ ne estas pretaj. La kongreso mem daŭros 3—4 tagojn, sed unu el la tagoj estos rezervita por ekskurso per aŭtobuso aŭ per ŝipo. Se la intereso estos sufiĉe granda, oni intencas aranĝi postkongresan ekskurson al la Norda Kabo, la plej norda punkto de la Eŭropa kontinento. La promontoro Norda Kabo estas celo de multaj turistoj, norvegaj kaj eksterlandaj. La revo de ĉiuj turistoj estas vidi la noktomezan sunon super la Arktika Maro norde. Por la ekskurso Tromsø — Norda Kabo — Tromsø oni kredeble devas kalkuli kvar tagojn (la distancoj estas grandaj ĉi tie en la Nordo!).

La sukceso de tiu ekskurso multe dependos de la vetero. Nur en klara vetero la suno estos videbla. Nuboj povos detrui la revon vidi la sunon noktomeze. Tamen tia ekskurso estos neforgesebla travivaĵo.

Kiam la programo de la kongreso estos preta, ni dissendos ĝin al interesigantoj, kun aliĝilo. Sed atentu: la kongreso okazos dum la turistsezono, kaj necesas mendi lokojn en hoteloj, ŝipoj k.t.p. tre frue. Jam en Aŭgusto 1974, do preskaŭ tutan jaron antaŭe, oni devas mendi la lokojn en la laŭbordaj rapidŝipoj! Ni jam rezervis ĉambrojn aŭ litojn en hotelo. Sed ni petas ĉiujn interesigantojn, provizore nedefinitive, anonci sin laŭeble baldaŭ al la Loka Kongresa Komitato, s.ro Rolf Holm (Delegito de U.E.A.), Lanesvn. 15, N-9000 TROMSØ, Norvegujo; telefono: (4783) 82154.

Bonvenon al Tromsø!

Herolv Olsen

prez. de La Norda Lumo kaj de la L.K.K.

JUBILEOJ**Tharald Dybing 90-jara**

Tharald Dybing, honora membro de NEL, jubileis en aprilo. Jam en 1906 li fariĝis esperantisto, kaj fondis la klubon La Tagiĝo en Stavanger 1922, kaj fariĝis ties prezidanto. Kiam li venis al Oslo li fariĝis aktiva membro de la klubo, kaj en la jaroj 1958—60 li estis prezidanto de Orienta Distrikto de NEL. Dum multaj jaroj li ekspedis la Norvegan Esperantiston al la abonantoj, kaj ĉiurilate estis fidela kaj fidinda laboremulo. Kompreneble li portas la ordenon Pro Merito ek de 1959.

Enevald Mårli 75-jara

Enevald Mårli fariĝis 75-jara la 16an de aprilo. En la jarlibro de UEA ni trovas lin meblotapetisto. Li do dum multaj jaroj servis al la internacia esperantomovado, kaj tio estas precize laŭ lia plej granda deziro: Al li la Interna Ideo estis kaj estas la ĉefa parto de Esperanto. S-ro Mårli naskiĝis en Gildeskål, sed en la jaro 1920 translokiĝis al Bodø, kie li lernis Esperanton en 1936. Kaj dum multaj jaroj, certe almenaŭ 20 jaroj, li estas prezidanto de la klubo en Bodø. Dum pluraj jaroj li ankaŭ estis prezidanto de la Distrikto. Li estas kavaliro de dua grado de Pro Merito.

Jenny Jahren 70-jara

Nekredebla fakto . . .

Kiu vidis ŝin instrui gelernantojn belkanti ne povas imagi, ke ŝi la 7an

de Junio rajtas aŭtobusi je duona prezo. Kiel unu el la fondintoj de La Esperantoklubo de Bergen ŝi fidele partoprenis la kluban laboron dum 40 jaroj, plejparte kiel estrarano, prezidanto, librokomisiito kaj fakdelegito de belkanto.

Jam en la mezo de la 30-oj ŝi prezentis esperantokantojn en radio kaj plurfoje ŝiaj «kantbirdoj» vizitis la klubon. — Kion ni plej bone memoras el ŝia riĉa vivo? Eble «la Esperantomuro» en ŝia ĉarma hejmo kie klubanoj kaj gesamideanoj de la tuta mondo kunvenis por admiri la kongresmemoraĵojn kaj ĝui la samideanan atmosferon. Ŝia telefono estas identa kun Esperanto en la telefonkatalogo, kaj tio signifas ke ŝi ĉiam estas preta respondi pri Esperanto aŭ prizorgi kontakton kun gesamideanoj. Cetere ŝi gvardis la fonetikan nivelon kaj plurjare redaktis nian vivan gazeton.

Ni sincere gratulas vin, kaj esperas ke ni longdaŭre povas ĉerpi el via fonto de hejmo kaj amikeco.

OFF

Karsten Langsholt 60-jara

Karsten Langsholt, Sarpsborg, fariĝis 60-jara! Jam kiel 20-jarulo li lernis Esperanton kaj restis fidela kaj aktiva ano jam dum 40 jaroj. En 1935 li estis inter la fondantoj de la Esperantoklubo en Opsund apud Sarpsborg, kaj fariĝis ties prezidanto. Li gvidis kursojn, verkis gazetajn artikolojn kaj estis aktiva ĉiurilate. Dum la jaroj 1953—58 li estis prezidanto de la Orienta Distrikto de NEL, kaj dum multaj jaroj li faris la revizoran

Recenzoj

La Tornistro 1973. Argentina Esperanto-Instituto. 50 paĝoj. Prezo: kr. 12,50.

El Argentino atingis nin la unua kajero de «La Tornistro, por instruoj kaj por distro», literatura jarkajero eldonata de Argentina Esperanto-Instituto. Malofte atingas nin eldonaĵoj el tiu lando. Des pli interesas kiam io aperas en tiu lando, kie la movado ŝajnas aktiviĝi. La kajero estas kuraĝa iniciato, la enhavo estas miksitaj, kvankam eble ankoraŭ malmulte «literatura», sed ĝi certe interesos multajn legantojn. Papero kaj preso ne tre bonkvalitaj, sed kun bela kovrilo.

«LA MIRINDA ELEKSIRO» Studkajero

«Ĉiu nacia lingvo estas ponto al unu sola popolo, sed Esperanto estas la ponto al ĉiuj popoloj».

Se vi lernis Esperanton, vi ne estas limigita balbuti nur kun bankistoj, portistoj, ŝoforoj kaj gvidistoj. Se vi antaŭe skribus karton al delegito de Esperanto en la urbo, kiun vi deziras viziti, vi povas esti certa ke vi akiras ĉiun helpon dezirindan. Vi renkontos homojn kun interesoj egalaj al la viaj, homojn kiuj jam ne estas eksterlandanoj ĉar ilia lingvo estas via

laboron al la klubo La Urso. Li estas honorata pro sia fidela laboro per la grado Kavaliro 2 de la ordeno de NEL, Pro Merito.

propra lingvo: Esperanto. Ĝuste tial via Esperanto devas esti flua kaj internacia (t. e. sen naciaj malbonaĵoj kaj eraroj). Por akiri tion vi devas ekzerci kaj ekzercadi. Unu helpilo estas bona literaturo, kaj en Esperanto ekzistas abunda materialo, kvankam ne ĉio egale taŭga por komencantoj. — Post la unua lernostadio vi tuj transiru al literatura legado.

Lektoro Johan Hammond Rosbach estas unu el niaj plej taŭgaj prozistoj kaj novelistoj. Li jam eldonis kvar novelarojn: «Bagatelo», «Homoj kaj Riveroj», «La mirinda eliksiro» kaj «Disko». — Nun la aŭtoro eldonis stud-kajeron, kiu pritraktas unu rakonton en «La mirinda eliksiro»: La Neĝbulo. La stencilita kajero speciale klarigas kaj prilumas vortojn kaj frazojn en tiu novelo, kaj estus granda helpilo por studecirkloj kaj kluboj, kiuj deziras eduki siajn komencantojn pli detale.

La studkajero estas havebla per mendo ĉe la aŭtoro:

Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B,
N 1700 — Sarpsborg,
Norvegio.

La kajero kostas 10 kronojn por unu ekzemplero, 8 kronojn je mendo de pli ol kvin ekz. Sed antaŭ ĉio aĉetu «La mirindan eliksiron», ĉar ĝi vere estas mirinda.

H. Fr.

LIBRO RICEVITA:

T. T. Anuruddha: La Vojo al Nirvana, aŭ la Dhammapado. Eld. de la Bô-Tât-Csona-Instituto por Budholgio, S. Vjetnamio.

H. Siemkiewicz: La lanternisto kaj aliaj prozaĵoj. Dansk Esperanto-Forlag.

La titolo de la libro ne tute klare prezentas la fakton: Temas ne pri libro de Siemkiewicz, sed pri tradukoj el la pola literaturo fare de Kazimierz Bein, Kabe, kaj estas represso el i. a. «Pola Antologio». Ni tre rekomendas la novelonitan libron, pro ĝia literatura valoro kaj pro la eminenta traduko.

Roso.

N. Barthelmess: Ne plu ludo... Sennacieca Asocio Tutmonda.

Temas pri noveloj kun klare politika tendenco: Parte en Germanujo, parte en Francujo ni povas sekvi junularon kaj infanojn subpremitajn sub la regantaj klasoj, ĉio pentrita per larĝa peniko kaj per nigra/blanka koloroj. La rakontoj estas verkitaj en la jaroj de la ckkresko de Hitlera reĝimo, en la komenco de la dua mondmilito aŭ tuj post la militfino. Tio povas multon klarigi pri la «pacifisma» tendenco — kvankam, ŝajnas al mi, tiu pacifismo estas nur unudirekta. La noveloj estas verkitaj kun la celo, doni al la SAT-movado porjunularan legaĵon. Ankaŭ tio estas grava faktoro, dum oni volas kompreni la libron.

La libro estas facile legebla, kun aventuro kaj plezuro, kaj tiel estas valora libro por atingi la celon al kiu ĝi celas.

Emulo

* KORESPONDUI

Mi dez. kor. kun vi; mi estas studentino de la 4a jaro. Denka Ganĉeva, Studenta Domo 801, Burgas, Bulg.

59-a Universala Kongreso de Esperanto

HAMBURG 27/7—3/8 1974

Alta Protektanto:

D-ro Klaus von Dohnanyi, Ministro pri
Klerigo kaj Scienco de FR Germanujo

Adreso de la Loka Kongresa Komitato:
Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80


La dua oficiala bulteno alvenis, kun informoj pri la programo, el kiu ni povas konstati, ke la kongresa semajno fariĝos same labor-, fest-, plezuro- kaj aventur-riĉa kiel la pli fruaj kongresoj. Inter la laborkunsidoj estas i. a. la diversaj fakaj kunvenoj, kaj la listo de 28 tiaj montras la diversecon kaj amplekson de la esperanto-movado. Inter la fakkunvenoj kelkaj estas notitaj kun temo. La instruisto diskutos pri «la oficialigo de la instruado de Esperanto: kiel kaj kie eblas», kaj ni esperas, ke la kunveno trovos vojojn ireblajn. — Skolta Esperanto-Ligo prezentos jenan temon: «Preparoj por la Tutmonda Jamboreo 1975». Kaj kiam ni scias, ke nur en nia lando estas miloj da skoltoj, kaj ke la «jamboreo», t. e. la granda internacia tendaro ĉe Lillehammer, bonvenigos milojn da knaboj el la tuta mondo, ni ne povas ne pripensi la eblecojn. Se nur ĉiu esperantisto en la tuta mondo konscius pri tiu ebleco!!

Ni ankaŭ notas, ke okazos diservoj, festaj aranĝoj, kulturaj programoj kaj konkursoj. Certe ni povos venontnumere raportiti pri tre bonkvalita aranĝo.

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstubben 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek



La Ofotlinio kaj ĝia historio

La lokomotivoj de la Ofotfervojo estos ekipitaj per radiotelefonaj instalaĵoj. SJ (la svedaj ŝtataj fervojoj) konstruas radiotelefonian sistemon por komunikado inter la teleragadejo kaj la trajnoj sur la fervojlinio inter Kiruna kaj Vassijaure. La instalaĵoj estas pretaj en 1973. Por plene eluzi la sistemon, SJ admonis al NSB instalati radiotelefonajn ekipaĵojn sam-specajn ankaŭ en la norvegajn trakciilojn kiuj trafikis la linion, kaj NSB decidis aĉeti tiajn instalaĵojn por 15 norvegaj trakciiloj.

Narvik bele situas sur duoninsulo inter Beisfjordo kaj Rombakfjordo ĉe la piedo de la iom pli ol 1200 m alta monto Fagernesfjellet. De la urbo estas belega panoramo super la Ofotfjordo, kaj oni vidas paradantajn montpintojn laŭ la tuta horizonto. Sed kvankam la montoj estas altaj kaj imponaj, ili ne ŝajnas premigaj, ĉar ili situas sufiĉe malproksime.

Dum la dua mondmilito Narvik kaj Ofotfjordo situis en la fronto kaj okazis multe da detruigoj. Nun ĉio estas rekonstruita, kaj la urbo prezentigas en nova formo.

La Ofotlinio iras de la haveno de Narvik tra la urbo kaj preter Narvik

stacio. Iom ekstere de la urbo la linio venas al la suda flanko de Rombakfjord. La plej longa parto situas en la montaro. Tra tranĉejoj kaj tuneloj, laŭ montarterasoj, tra ŝtonkrutaĵoj kaj sur altaj muroj ĝi fakte gratigas sin al la montflankoj. Ĉe Stramsnes stacio, 10 km de Narvik, estas bienoj kaj aliaj konstruaĵoj, sed pli oriente estas nur stacidomoj kaj loĝejoj por relvojinpektantoj. Jam ĉe Rombak, proks. 20 km de Narvik, komencas la altmontardistanco. Inter Rombak kaj Katterat ĉe Rombakbotn la linio situas 350 m. s. l. m. De Katterat ĝi iras tra kruta tereno laŭ la malvasta valo Norddalen kiu transpasiĝas sur la 180 m longa ponto Norddalsbrua, 40 m super la valfundo. Poste la linio iras trans la altmontarebenaĵo al la landlimo. La lasta norvega stacio, Bjørnfjell, situas 2 km de la limo, 514 m. s. l. m. Tio signifas, ke je ĉi tiuj latitudoj oni atingis la arbarlimon. Ĉi tie estas bonaj eblecoj por ĉasado kaj fiŝkaptado kaj estas bonega tereno por skiado. Dum la grandaj ekskurstagoj en marto/majo estas viglega en la landlimregionoj. Meznombro po jare transpasas pli ol 140 000 vojaĝantoj la landlimon.

LINGVA PAĜO

Akademijaj notoj

La Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko de la Akademio, en akordo kun la Prezidanto, atentigas redaktorojn de gazetoj, aŭtorojn, kaj ĝenerale ĉiujn uzantojn de Esperanto pri jenaj ĉiam pli disvastiĝintaj eraroj:

- a Oni skribu *ekde* aŭ *eke de*, sed NE *ek de* en du vortoj, ĉar *ek* estas tie uzata prefikse aŭ adverbe, sed ne kiel interjekcio.
- b Oni ne uzu *dank em a*, kiam ne temas pri konstanta emo al danko, sed pri momenta manifestiĝo de danko pro konkreta servo.
- c Oni ne konfuzu *kompensi* kun *re-kompenci*:

Kompensi: havigi (al iu) ion egalvaloran pro suferita perdo, profito, aŭ farita peno.

Rekompenci: montri sian kontentecon pri ies meritoj per vortoj, faroj aŭ donacoj (kvankam bona ago ofte rekompencas la farinton propramove per sano, feliĝo, kontenteco, interna paco). «Rekompenci» estas preskaŭ ĉiam «malpuni».

★

La Akademio, post vastaj internaj diskutoj, malkonsilas la uzadon de la prepozicio PO por esprimi la rilaton indikitan per la frakci-streko en esprimoj kiel 30 km/h kaj similaj, kiel rektan eraron kontraŭ la ĝusta signifo de tiu prepozicio, difinita de Zamenhof en unu Lingva Respondo.

Manke de specifa prepozicio por tia uzado, la Akademio lasas liberecon al fakuloj elekti inter la prepozicioj EN, JE, POR aŭ SUR, laŭ la ĉirkonstancoj, aŭ uzi adverban formon, kiel «30 kilometroj(n) hore».

Kiun vorton uzi?

Temas pri du vortoj en la «Malŝlosilo». Neniu el ili estas en PIV (Plena Ilustrita Vortaro).

1. *Traŭli*: *tråle*. Sekve: *traŭlo*: *trål*. En PIV estas la vorto TROLO por tiu fiŝilo. Kvankam tiu sama vorto ankaŭ signifas monstron en niaj fabeloj, certe neniu miksas ilin en la kunteksto.

2. *Akjo*: *Pulk*. — Temas pri veturilo, kiu baldaŭ tute ne ekzistas, alie ol en muzeoj. En la tri skandinaviaj landoj la nomo de tiu objekto estas: *pulk* — *pulka* — *pulkka*. En Finnlando oni krom la lasta vorto ankaŭ diras AHKIO.

Mi ne scias pri la rusa kaj Sibirgentaj vortoj por tiu veturilo. Sed alilande oni supozeble povas nomi ĝin nur en kombino kun la plursignifa vorto veturilo. Ekzemple france. Traîneau lapon. Vilho Setälä en sia Suomi-Esperanto Sanakirja klarigas la vorton tiel: PULKKA — lapona boatforma glitveturilo — «pulko». Kaj aliloke: AHKIO — lapona glitveturilo — pulko.

Do: Kial ne uzi la vorton, kiu estas plej konata en la lando, kie tiu objekto troviĝas? Kial krei novan vorton? En la kunteksto, ĉu skribe aŭ buŝe, oni certe ne miskomprenas, ĉu temas pri glitveturilo aŭ Meksikana brando (Pulkvo)?

Johan Eilertsen



Mi havas plezuron

sciigi al vi pri mia feliĉa edziniĝo la 9an de februaro 1974.

Kvankam mi evitis fruan edziniĝon, mi senhezite konsentis edziniĝi al Asbjørn Nielsen el Arendal, ĉar li estas naskita nur por mi, ĉar lia sincereco kaj fideleco estas senduba. Estas tre strange, ke mi povas esti tute certa pri estonteco kun Asbjørn el tute alia kulturo, sed mi sentas lin plej proksima kaj komprenas kiel min mem. Nun mi ĝuas vivon sen hejmaj laboroj, ĉar li volonte faras ĉion: aĉetado, kuirado, lavado, purigado, gladado, kudrado, ordigo k.t.p. Tage li laboras en gimnazia biblioteko de Oslo kiel bibliotekisto. Mi mem havas ankoraŭ unu jaran studon. Ĉar mi havas tre multajn geamikojn, mi esperas ke vi helpas informi per via organo pri mia edziniĝo. Mi sendas fotojn el la ceremonio kiu okazis en Esperanto.

Sincere via

Tamiko Kauakami Nielsen

Norvega Kroniko

La Urso, Sarpsborg.

regule kunvenas ĉiun duan merkredon. Ĉiu kunveno komenciĝas per instruado. La duono de la membraro estas junaj novuloj. En ĉiu kunveno okazas ia konkurso, kiu enspezigas monon al la kluba kaso aŭ por fortigo de la ekonomio de Norvega Esperantisto — aŭ por la kontorfondado.

Ordinare okazas ankaŭ prelego. En la unua kunveno en 1974 nia klubano Stig-Otto Forsberg, ŝipa direktilisto, kiu estas hejme post dujara deĵorado en sia ŝipo, prelegis pri la urbeĝo Bombay kaj la vivo tie, kaj en la dua kunveno lia edzino, Eva Forsberg, kiu partoprenis vojaĝon ĉirkaŭ la tero, montris bildojn el New York kaj el Filipinoj, kaj interese rakontis pri la restadoj tie.

En la generala kunveno oni reelektis la prezidanton Johan Hammond Rosbach, la vicprezidanton Trine Lise Bryn, la sekretarion Thure Resberg, kaj la kasistinon Sigrīd Birch Olsen. Estraranoj fariĝis Liv Skjeltorp kaj Bjørg Nørsted. Du el la membroj de la estraro estas junulinoj.

R.

Studenta Esperanto-Societo

Generala kunveno okazis la 23an de jan. 1974 en la Universitato, Blindern. Oni pritraktis la kutimajn punktojn kaj elektis jenan estraron: prezidanto: Arne W. Aasland (nova), vicprez.: Otto Prytz (nova), sekretario: Olav Hage (reel.), kasisto: Erling Killingbergtrø (reel.), estrarano: Sigrun

Mæland (nova); anstataŭantoj: Margrete Landmark kaj Harald Støp-Bowitz (novaj).

Ci-printempe Studenta Esperanto-Societo intencas aranĝi serion da kunvenoj, dum kiuj oni diskutu iun aspekton de nia movado. La unua el tiuj kunvenoj okazis la 11an de Febr. ĉe Arne Aasland, kaj la temo estis «la historio de la ideo pri universala lingvo.» C. Støp-Bowitz prezentis kelkajn faktojn, kaj ni havis la okazon diskuti la problemon. Agrabla kunestado estas ankaŭ grava parto de tiuj kunvenoj, kaj la estraro celas plibonigi la kontakton inter la membraro. — Domaĝe estas, ke nur malmultaj neestraranoj partoprenis.

Nia membro Tom Arbo Høeg el-laboris katalogon de interlingvistika literaturo troviĝanta en la Universitata Biblioteko de Oslo. Li ankaŭ iniciatis serion de publikigaĵoj verkitaŭ aŭ tradukitaŭ en Esperanton de membroj de S.E.S. Jam aperis tri publikigaĵoj en tiu serio.

Otto Prytz.

La Norda Stelo, Hamar

Jarkunveno la 18an de februaro. La prezidanto deziris bonvenon kaj gvidis la kunvenon. Sekvis la raportoj de la sekretariino kaj de la kasisto. Ambaŭ raportoj estis aprobitaj post kelkaj rimarkoj.

Jen la elektoj: Kåre Bye, prez.; Alf Strømnaess, vicprez.; Johs. H. Lund, kasisto; Per J. Krogstie, ano; Elise Koller, sekr.; Else Stang kaj Elisabet Christensen, anstataŭantinoj. — Kafo-paŭzo kun babilado kaj lotumado.

Per J. Krogstie montris belajn lumhildojn kaj interese rakontis pri voj-

aĝo kiun li, lia edzino kaj gesinjoroj Engen la pasintan someron faris en Orienta Eŭropo. Dum la vojaĝo li multloke en Esperanto informcele prelegis pri Norvegujo.

Ekino.

Klubo Esperantista en Oslo

21/1. La prezidantino deziris bonvenon kaj deziris bonan novjaron. — Lovise Bøe legis interesan artikolon de Margaretha Almqvist pri Nordmarka, — pri ĝia situo, pri la bestoj kiuj tie vivas kaj pri la superstiĉo en la antaŭaj tempoj — pri koboldoj, arbarnimfoj kaj niksoj. — Poste okazis divenkonkurso aranĝita, kiel kutime, de Thor M. Carlsen. John Berggreen informis, ke estas sendita petletero al la Televido por en «Kveldsforum» aranĝi programon pri: «La mondlingva problemoj kaj Esperanto».

Raportis Odd Kolbrek.

5/2. La prezidantino bonvenigis. — Otto Prytz prezentis «Miksitaĵn bombonojn el Hispanujo», do, li humore plene rakontis pri la travivaĵoj dum sia unujara restado en Hispanujo, i.a. pri sia studado de la ordinara buŝa lingvo de ordinaraĵoj, pri la malfacilaĵoj pri kaptado kaj konservado de ĉi tiu lingvo per magnetofono kaj pri la situacio de la blinduloj tie. C. Støp-Bowitz memorigis pri nia honora membro Emmy Henriksen kiu forpasis. Ŝi pro malsano dum pluraj jaroj ne povis partopreni la kluban vivon, sed ŝi iam estis tre aktiva. Pro la donaco okaze de sia 60-jara naskiĝtago en Decembro C. Støp-Bowitz kore dankis.

Raportis Kirsten Ek.

18/2. La prezidantino bonvenigis. Interese kaj amuze Tom Arbo Høeg priparolis katalogon pri interlingvistika literaturo en la universitata biblioteko en Oslo kiun li ellaboris laŭ iniciato de Studenta Esperanto-Societo. Ĝi enhavas 667 titolojn de libroj en la biblioteko, estas dividita en grupoj, kaj relative ampleksa estas la grupo kiu temas pri Esperanto. Li ankaŭ montris kelkajn malnovajn libretojn, i. a. tre malnovan, verkitan de L. Zamenhof. C. Støp-Bowitz priparolis la novan, modernan lernolibron, kiu estas ek de nun aplikata kaj kiel studmaterialo por korespondkursoj kaj kiel ordinara lernolibro. Ludvig Anjer paroletis pri «La semajno de amikeco», kaj poste la ĉeestantoj vigle partoprenis en skribado de kartoj, i. a. kun saluto de la klubo al esperantistoj kaj al kelkaj radiostacioj kiuj elsendas programojn en Esperanto.

Reportis *Odd Kolbrek*.

5/3. Ĝenerala kunsido. Post kiam la prezidantino, Pepita de Caspary, malfermis, elektiĝis kiel kunvenigvidanto C. Støp-Bowitz.

La jarraporto pri 1973, la raporto de la komisiitoj kaj la kalkulraporto estis aprobataj. La elekto donis jenan rezulton: Prez.: Pepita de Caspary, vicprez.: Thor Magnus Carlsen, sekretario koresp.: Kirsten Ek, sekretario raport.: Odd Kolbrek, kasisto: Lovise Bøe, estraranoj: Brynhild Østmo, Aase Gustavsen, anstataŭantoj: Randolf Grotmål, Harda Danielsen, studigvidanto: Kirsten Ek.

Krome elektiĝis 2 revizoroj, propagandestro, gazetara reprezentanto,

radiorepresentanto, komisiito de Eldonejo Esperanto, raportanto al Norvega Esperantisto, elekta komisiono kaj Delegito kaj Vicdelegito de UEA.

Dum la punkto Eventualaĵoj oni diskutis la partoprenadon kaj la vojaĝeblecojn al la U. K. en Hamburgo. Pro la mallonga distanco tien, oni ne aranĝos karavanon.

Post la fino de la ĝenerala kunsido la prezidanto transprenis la gvidadon kaj legis amuzan poemon, kiun ŝi poste kantis, pri tio kiel agrable la estraranoj travivas la estrarkunvenojn.

Dum la kunsido vendiĝis libroj por 122,50 kr.

Reportis *Odd Kolbrek*.

18/3. Klubkunveno. — Kirsten Ek bonvenigis. Poste ŝi informis pri la vojaĝeblecoj al la landa kongreso en Tromsø venontjare. Eble estos komuna ŝipvojaĝo de Bergen, de Trondheim kaj de Bodø, kaj estos elsendataj informoj pri la biletprezoj ktp. Laŭ informoj de C. Støp-Bowitz la klubo en Tromsø preparos postkongresan ekskurson al Norda Kabo kaj ekskurson en la ĉirkaŭaĵo de Tromsø. Espereble ankaŭ eksterlandaj esperantistoj multnombre partoprenos. Oni intencas eluzi ĉi tiun okazaĵon, kiu la landa kongreso estas, por propagandi por Esperanto.

Libroj vendiĝis por 34 kr.

En la kunveno la 4an de decembro lastjare la klubo ĝuis tre amuzan skeĉon «La sorthoro», en kiu aktoris Kirsten Ek, Kari Kalsås, John Berggreen sub reĝisorado de Brynhild Østmo.

Reportis *Odd Kolbrek*.

2/4. La vicprezidanto bonvenigis. C. Støp-Bowitz referis cirkuleron de N.E.L., i. a. pri memorigo pri la kotizoj por 1974, pri admono pri kontribuado al la diversaj fondaĵoj kaj pri la nova lernolibro «Esperanto 1» — poste aperos nova perfektiga lernolibro, «Esperanto 2». Prezentiĝis leterro de Klubo Esperantista de Malmö, Svedujo, kiu deziras interŝanĝi sian bultenon kun tiu de nia klubo. Okazis divenkonkurso, 12 demandoj, kiel kutime aranĝita de Thor M. Carlsen. Fine Otto Prytz interese prelegis pri la temo «La utileco de Esperanto por la lernado de kiu ajn lingvo». Li montris per ekzemploj el diversaj lingvoj, ke la analogioj en Esperanto estas pli bona bazo por lerni fremdajn lingvojn, ol la analogioj en aliaj lingvoj. Vendiĝis libroj por kr. 83,10.

Reportis *Odd Kolbrek*.

Sauda Esperantoklubb

kunvenis la 18an de februaro ĉe ĝesinoroj Birkeli. Ĉeestis 12 klubanoj. La novelektita prez., Norman Birkeli, bonvenigis kaj poste legis leteron de Vestlandets Krets pri la venonta jarkunveno. Post diskuto la klubanoj aprobis la proponon de la estraro: okazigi tiun jarkunvenon aŭtente samtempe kun «La renkonto sur Haŭkelimonto». — Norman Birkeli daŭrigis sian serion «La kluba historio». Zorge kolektitaj ekzempleroj de Norvega Esperantisto, ek de la unua gazeto, estas la bazo por tiu serio.

Lingva duonhora estis prezentata de Olav Andersen. La klubanoj ricevis taskojn antaŭ la kunveno, kaj oni vigle diskutis la diversajn solvojn por trovi la plej belsonan kaj korektan.

La dommastrino, Lilli Birkeli, regalis per bonega kafo kaj manĝo. Esperantaj kantoj kaj babilado ĉe la tablo.

Post la kafopaŭzo Elna Matland legis leteron de NEL. pri «Esperanta Influgrupo». La rezulto de la posta diskuto estis, ke la klubo instigas, ke oni efektivigu tiajn grupojn. — Fine Johan Matland rakontis pri la kongresurbo Hamburgo kaj speciale pri la kongresejo. Li mem ĉeestis la lokon kaj trarigardis ĝin. Li montris broŝurojn kaj memfaritajn lumbildojn pri la urbo kaj la kongresejo. Certe tiu programpunkto vekigis la emon iri al la kongreso inter la klubanoj!

*

Kunveno lunde la 18an de marto ĉe ĝesin. Bjerke. Bonvenigis la klubanojn la prez. Norman Birkeli. Poste li daŭrigis sian raporton pri la kluba historio. Ĉifoje li rakontis pri spertoj kiujn li ekhavis kiam li parolis nur esperanton al sia filino ek de ŝia naskiĝo, kaj pri artikolo, kiun li skribis en Norvega Esperantisto pri tio. Konata angla esperantisto s-ro Butler respondis al la artikolo kaj donis interesajn vidpunktojn pri simila instruado de esperanto kaj aliaj lingvoj. Lingva duonhora ĉifoje estis prezentata de s-ro Bjerke. La taskoj estis malfacilaj kaj sekve kaŭzis cerbumadon kaj babiladon tre lernigan.

Post kafopaŭzo kun bonega regalo de s-ino Agot Bjerke, s-ro Olav Andersen montris lumbildserion akompanitan de muziko kaj recitado. — Sin anoncis du novaj membroj al la klubo, ĉu tio okazis al via klubo lastatempe?

Olav Andersen

La Norda Lumo, Tromsø

En kunveno 30/1 la elektoj rezultis jene: Prezidanto: Herolv Olsen, kasisto: Olav Olsen, estrarmembro: Birgit Hanssen, raportanto al Norvega Esperantisto: Johan Eilertsen. Herolv Olsen krome akceptis la taskon interrilati kun la Eldonejo.

La prezidanto petis, ke ni ne reelektu lin, pro lia okupiteco en pluraj kulturaj aferoj, krom lia laboro por Esperanto. Sed pro lia jam komencita laboro por prepari la tutlandan kongreson 1975 en Tromsø, ni persvadis lin, por ne kaŭzi interrompon.

Oni decidis donaci 50 kronojn al la kontorfondaĵo. Krome aboni por 10

varbabonoj de la gazeto por bibliotekoj kaj diversaj atendejoj.

Ĉar Tromsø fariĝis tre ŝatata kongresurbo ni jam mendis ĉambrojn en du hoteloj. La kongreso de NEL komencos vendrede la 4an de julio 1975.

Bedaŭre ni devas konstati, ke ne estas facile varbi novajn anojn. Por Esp.-kurso en **FRIUNDERVISNING** nur anoncis sin tri lernantoj, do ĝi ne okazas. Sed lastaŭtune Herolv Olsen gvidis kurson kun 10 lernantoj. Kelkaj el ili partoprenas studrondon por pliperfektigi.

J. E.

* * *

KORESPONDU !

Mi dez. kor. kaj interŝ. bildkartojn. Mi estas 21-jara fraŭlo. Ruslan V. Nikolov, str. Pliska no. 7, Varna, Bulg.

NORSK ESPERANTO-FORBUND
(*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 10030

Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo:

Boks 942, Oslo. Postgiro 10032

ESPERANTOFORLAGET A/S
(*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 10031

Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 1 33 29

La redakcio:

Hans Amund Rosbach, Nergt. 37 c,
6500 Kristiansund N. Telefon: 77620

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo 1

HELSINGØR 1974

tuj antaŭ UK de Hamburgo

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos 21.—27. de julio en La internacia Altlernejo de Helsingør. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ la kongreso de Hamburgo. — Karavanvojaĝo el Helsingør al Hamburgo, kaj reen, estos aranĝata per trajno speciala por la kursanoj.

Programo senpage havebla ĉe

L. FRIIS

Ingemannsvej 9,

DK-8230 Åbyhøj, Danlando